



2015-51 sendita el Kijivo, en la 29a de novembro; la versio PDF estis postkreita.

Al: Landaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne), Fakaj Asocioj, la Komitato, Konsilianoj, ILEI, TEJO, listoj kaj unuopuloj. Sufiĉas peto por ricevi la komunikojn regule.

Formalaj bezonoj por ebligi estontan agadon

Bona aĝmikso ĝojige karakterizas la tridekon da homoj, kiuj ariĝis el pluraj kluboj kaj urboj de Ukrainio por partopreni en la 21a Kongreso de UkrEA. Multis la decidendaj aferoj, feliĉe la kongreso estis kvoruma. Post bonvenigo, la prezidanto de UkrEA alprenis nur raportan kaj konsilan rolojn, ĉar la delegitoj elektis kongresestron, Serhij Prudko (foto dekstre), kiu prezidis ĉion plian. Decidoj sekvis pri komisionoj kongresaj: rezolucia, kalkula, mandata, nomuma por kelkaj oficoj. Tio montras la profundon de la talento kaj sperto. La aranĝo estis teknologie altnivela, kun bona sistemo kaj kvar grandaj ekranoj, uzataj por apogi la laborojn.



Prezidanta Raporto

La prezidanto de UkrEA, s-ro Eŭgeno Kovtonjuk (dekstre en la maldekstra foto okaze de transdono de libroj por la Asocio), prezentis la laborojn de la antaŭa jaro en du kategorioj. Kiel **mankoj** estas la nekreo de fiksita labroplano; decidoj de la 20a Kongreso formis la planon. Ne sukcesas regula eldonado de la revuoj 'Helianto' kaj 'Ukraina Stelo' kaj la Jarlibro 2015 por ukrainoj. La **atingoj** feliĉe formas pli ampleksan liston:

- La 21a Kongreso estis organizita kun harmonia etoso, kiu mankis tra la lastaj kongresoj.
- La membrolisto estas reguligita, interalie per vizitoj al provincaj urboj.
- Lige kun tio membrokartoj sigelitaj estas eldonitaj.
- Junuloj revenas al membreco kiel unuopuloj - inter ili novuloj.
- Tri novaj kluboj estas fonditaj: Arto en Kijivo, *Esperanto-Buk* el Ĉernivci; unu en Lviv.
- E-rondo regule kunvenas en Kijivo por homoj el aktivula kerno.
- E-centro estas fondita ene de la Universitato de Luĉjk.
- Informa agado kun stando, ekspozicioj kaj pliaj iniciatoj okazis en pluraj urboj.
- Vizitis la vicprezidanto de UEA trion da urboj, kun ripeta vizito al la kongreso.
- Bona kresko en la nombro de Individuaj Membroj de UEA.
- Rekorda partopreno de 19 ukrainoj (17 junaj) en la UK en Lillo kun vizito al Parizo.
- Jure atestitaj duplikatoj de la antaŭe mankintaj dokumentoj estas ricevitaj
- La ekzistorajtoj de la Asocio estis konfirmita dekon da tagoj antaŭ la kongreso, kio pavimas la vojon por necesaj statutŝanĝoj, prilaborataj dum la nuna kongreso.

Rivela raporto pri junulara agado

Jen granda kaj nekonata surprizo. La Konsiliano pri Junulara Agado, Lobanova Liza, raportis laŭmonate: Februare fondiĝis nova ĉefurba klubo 'ARTO' kun membroj inter 16- kaj 40-jaraj. Marte ekaperis serio de allogaj lernigaj filmoj, kun temoj kiel: bestoj, floroj, sportoj ktp. Aprile: koncerto omaĝe al Vasil Eroŝenko. Maje: plia renkontiĝo. Junie: E-Junulara partopreno en bonfara fiore favore al leŭkemiaj infanoj. Julie: Partopreno de 10 junuloj en la UK en Lillo kaj

7 infanoj en la IJK. Plie, du junuloj estas senditaj eksterlanden laŭ volontulaj programoj, unu al Slovakio, alia al Pollando. Por estonto gravas allogo de pli da junuloj al instigaj kursoj.



La kongreso mezvojas kaj havas multajn taskojn, interalie rekonsistigi la Prezidion, diskuti kaj aprobi modifojn al la Statuto, decidi pri la estonto de ULEI, la instruista sekcio kaj tre grave formi strategion.

Saluto al la Malferma Tago en CO

Kijivo kore salutas la partoprenantojn de la Malferma Tago de la Centra Oficejo, hodiaŭ okazanta en Roterdamo. La kongreso havas multajn taskojn, interalie rekonsistigi la Prezidion, nomumi novan Ĉefdelegiton, diskuti kaj aprobi modifojn al la Statuto, decidi pri la estonto de ULEI, la instruista sekcio, kaj – tre grave - formi strategion. Ni deziras agrablajn horojn al la samideanaro en Roterdamo!

Eŭgeno Kovtonjuk, prezidanto de UkrEA
Serhij Prudko, kongresestro
Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA.

635 vortoj

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

La teksta enhavo de komunikoj el 2015 kaj 2014 (53 komunikoj) legeblas ĉe:
www.uea.org/vikio/Komunikado_kun_LA,_FA...